# LIGILO

DE

BRAZILA ESPERANTO-LIGO

N-RO 19 - JUL/AŬG/SEP 1993

## KARA LEGANTO

NI DISKONIGU ESPERANTON!

La Kongresoj estas la kulminaj punktoj de nia movado. Kompetente organizitaj en la lastaj jaroj, ili prezentadis altnivelajn artajn, kulturajn kaj primovadajn aranĝojn. Espereble la venontaj estos karakterizitaj kiel forumoj por pridiskutado de niaj gravaj demandoj, kiam la BEL-anaro ĉefrolos kiel la solaj interesatoj pri niaj problemoj, kaj ĉerpos instruojn montrantaj la vojojn por ilin solvi. La Rezolucio koncerna al la ĉi-jara kongresa temo pravigas la proponojn de BEL en la lasta LIGILO, por ke la esperantistoj, individue aŭ grupe, prezentu projektojn celantaj la enkondukon de Esperanto en la diversajn homgrupojn de nia socio. La reagoj atingintaj nian sidejon montras ke la proponoj venas renkonte al la penso de ĉiuj kiuj deziras kontribui por nia progreso. Se post nia centjara ekzisto ni ne ekkaptis ankoraŭ sufiĉe grandan nombron de adeptoj, kulpas ni mem kaj ne la idearo de la Internacia Lingvo. Kompreneble ne ĉiuj homoj estas pretaj akcepti niajn ideojn kaj proponojn, ĉu pro manko de adekvataj mondkonceptoj, ĉu pro antaŭjuĝoj, ĉu pro aliaj motivoj. Tamen la fido je nia idealo, la faktoj ke multaj homoj propravole serĉas la E-instituciojn en nia lando, kaj la ekzemploj de trafa laboro por Esperanto en aliaj mondpartoj estas kuraĝigoj por ke ni profitu niajn fortojn por la semado de niaj ideoj, surbaze de modernaj metodoj kaj uzante taŭgajn rimedojn, ĉefe homajn, kiujn ni facile trovas en nia medio. Notindas ke la du lastaj ĉefartikoloj de LIGILO sekvis linion formanta kun la Kongresa Rezolucio ŝlosilon karakterizanta la dezirojn kaj de BEL-estraro kaj de la esperantistaro por ke la mesaĝo de la Internacia Lingvo atingu grandan nombron da homoj en nia lando: NI LABORU KUNE! kaj NI MOVIGU LA MOVADON! por ke pli efike NI DISKONIGU ESPERANTON!

# LIGILO

Oficiala organo de
BRAZILA ESPERANTO-LIGO
Caixa Postal 03625 70084-970 Brasilia (DF) Telefono: (061) 226-1298

Aperas trimonate
Redaktas BEL-Estraro

ESTRARO DE BEL

Prezidanto . . . . . Francisco Mattos de Oliveira
1-a Sekretario . . José Carlos Dorini Ramos
2-a Sekretario . . Wilson Álvares de Oliveira
3-a Sekretario . . Lício de Almeida Castro
1-a Kasisto . . . . Aymoré Vaz Pinto
2-a Kasisto . . . . Maria das Dores Góes

Kontrolkomisiono

Altino Araújo Vasconcellos
José Romão Filho
Paulo Ricardo Grazziotin Gomes

Anstataŭantoj

Adolpho de Miranda Silva
Ismael de Miranda e Silva
Maria Isabel Botelho Ramos

PREZIDANTO DE FEDERACIA KONSILANTARO

D-ro Ivaldo Alves de Souza

KOMITATANO "A"

Symilde Schenk Ledon

LIBROSERVO

Francisco Mattos de Oliveira
Adolpho de Miranda Silva

PERKORESPONDA KURSO

Francisco Mattos de Oliveira
Carlos Maria

INFORMADIKO

José Carlos Dorini Ramos
Wilson Álvares de Oliveira

ARKIVO

Cleto Galvão da Silva

## VALENCIO...SAN-PAŬLO...RIBEIRAO PRETO

En julio ĉi-jare tri gravaj urboj fariĝis scenejoj kie la esperantistoj ĉefrolis. Kompreneble aliaj urboj tra la mondo samgravis en julio por la Esperanto-movado. Ni reliefigas la tri pro tio, ke BEL-estraranoj partoprenis ties esperantajn aranĝojn kaj kolektis informojn por prezenti ĉi tiun raporteton.

## VALENCIO KAJ LA 78-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Valencio estas mediteranea marborda urbo en la orienta parto de Hispanio. Laŭ la kvanto de loĝantoj, ĝi estas la tria urbo de la lando. Gin fondis romiaj soldatoj en 138 a.K., sed vere grava ĝi fariĝis nur kiel centro de aparta emirlando dum la 8-a jarcento. Maŭra ĝi restis dum plenaj kvin jarcentoj. Tion oni tuj rimarkas en la antikva centro trovante sin meze de romanikaj kaj gotikaj konstruaĵoj kvazaŭ plantitaj en maŭran urbokernon. En tiu ĉarma urbo okazis la 78-a Universala Kongreso de Esperanto, kies temo estis "Klerigo por la 21-a jarcento."

La kongresejo estis la "Palau de la Música i Congresos de València". Kvankam tre granda, ĝi ne sufiĉis por enteni ĉiujn partoprenantojn. Pro tio, alia konstruaĵo, ĉirkaŭ 800 metroj malproksime de la "Palau" ankaŭ funkciis kiel kongresejo. Bedaŭrinde, tiu "dua kongresejo" fariĝis malkomforta pro la tiama varmeco en Valencio - preskaŭ 40 centgradoj! Kontraŭe, la "Palau" kun sia klimatizita aero kaj teknikaj rimedoj tre plaĉis al la ĉe-estantoj.

Cirkaŭ 1900 homoj el 64 landoj aliĝis al la 78-a UK. Krom hispanoj, la plej grandaj nombroj de aliĝintoj venis el Pollando, Francio kaj Japanio. Laŭprofesie, pedagogoj estis la plej grandnombraj.

La gazetaran servon profesie zorgis Gian Carlo Fighiera. Ekde du monatoj antaŭ la UK, tiu servo sendis informmaterialojn al preskaŭ 500 adresoj de ĵurnaloj, TV kaj radi-stacioj kaj novaĵagentejoj, kio rezultigis plurajn noticojn, artikolojn kaj tutpaĝajn intervjuojn.

Gravaj homoj sendis saluton al la UK, nome Boutros Boutros Ghali, Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj; Francisco Mayor Zaragoza, Ĝenerala Sekretario de UNESKO; Camilo José Cela, Nobel-premiito pri Literaturo; Papo Johano Paulo, la 2-a kaj Jan Kieniewicz, ambasadoro de Pola Respubliko en Madrido.

La 78-a UK mem komenciĝis per la tradicia interkona vespero. Ci-foje ĝi okazis en plaĝa klubo, kie la ĵus venintoj frandis gigantan valencianan rizaĵon ("paeljo") kuirita en ŝtala ujo pezanta 1000 kilogramojn. Post tiu mirinda vespermanĝo multaj kongresanoj longe dancis, eble por faciligi la digeston...

Sekvantan tagon, en la solena malfermo, la giganta paeljo venis al nia menso. Tio okazis pro la parolado de John Wells, prezidanto de UEA. Li diris: " Vi ne sukcesos fari bonan paeljon kun nur kuniklaĵo kaj helikoj, des malpli per nur salo kaj akvo. Kiu volus, nome de iu "pureco", uzi nur unu el la nepraj ingrediencoj, tiu fiaskus. La samon celas la Esperanta idealo: la popoloj formu unuecan tuton gardante sian identecon, fakte pro ĝi". Salutvortoj de esperantaj gravuloj kaj kongreslandaj aŭtoritatuloj sekvis la paroladon de John Wells. Poste salutis la kongreson reprezentantoj de la diversaj landoj. Reprezentis Brazilon la komitatano "A", S-ino Symilde Schenk Ledon.

S-ino Symilde ankaŭ partorpenis kunsidojn de UEA-Komitato, kaj informis nin, ke speciala atingo estis la ekenkonduko de Instanco pri Latinamerika Agado, kies respondeculo estas D-ro Ulrich Lins. Laŭ ŝi, la dumkongresa laboro de la komitatanoj kaj estraranoj de UEA signifis pli ol 30 horojn en kunsidoj publikaj, ne publikaj, laborgrupoj kaj aliaj aranĝoj. Tiuj homoj meritas niajn aplaŭdojn ĉar por ili kongresi signifas pli ol distraj eventoj, promenoj aŭ kunfratiĝo.

Dum la tuta semajno, de la 24-a ĝis la 31-a de julio, la programeroj sinsekvis: Internacia Kongresa Universitato, kun fakaj prelegoj far de elstaraj esperantistoj; publikaj kunsidoj de Akademio de Esperanto; esperantologiaj konferencoj; internacia ekzameno; seminarietoj pri eŭska, galega, kastilia kaj kataluna lingvoj; konversaciaj rondoj; fakaj kunsidoj de blinduloj, fervojistoj, filatelistoj, filozofoj, instruistoj, ĵuristoj, ĵurnalistoj, komercistoj kaj ekonomikistoj, kooperativistoj, medicinistoj, muzikistoj, naturistoj, naturkuracistoj, poŝtistoj, radio-amatoroj, samseksamuloj, sciencistoj, skoltoj, ŝakistoj, vegetaranoj, verkistoj.

Kunvenoj de ateistoj, bahanoj, katolikoj (IKUE), kristanoj (KELI), oomotanoj, spiritistoj, kaj ekumena diservo en granda katredalo kontentigis la diversajn pensmanierojn kaj religiajn sentemojn. Asocio Mondo Spiritisma, de Braziljo, disdonis pere de sia reprezentanto, S-ro Ismael de Miranda e Silva, 150 librojn "La Cielo kaj la Infero", titolo kiu estis la temo de kunveno aŭspiciita de Brazila Spiritisma Federacio.

Rilate al la distraj eroj, elstaris la ekskursoj, bankedo, balo, teatraĵoj kaj Nacia Vespero kun prezentado de hispanaj muzikoj kaj dancoj. La Valencia Orkestro dum la Nacia Vespero prezentis nian himnon surbaze de partituro, kiun ili havas ekde 1909, kiam Zamenhof vizitis postkongreson en Valencio okaze de la tiujara Universala Kongreso en Barcelono.

La Belartaj Konkursoj premiis 12 partoprenantojn pri poezio, prozo, teatraĵo, kanto kaj infanlibro. Menciinda estas tio, ke al BEL-ano Flávio Fonseca estis aljuĝita premion "An-okin" pro lia verko "Babelturo".

Komuna kantado de La Espero kaj adiaŭo per "ĝis Seulo!" finis tiun belan kongreson, la 78-a UK.

## SAN-PAŬLO KAJ LA BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

San-Paulo, la dua plej granda urbo en la mondo, originis de porindigena misio fondita de portugalaj jezuitoj en 1554. En ĝi kunvivas homoj venintaj el diversaj landoj, en tiel granda kvanto, ke ĝi fariĝis monda urbo. Se, ekzemple, vi trairas kvartalojn de japanaj kaj italaj devenantoj, kun ties tipaj konstruaĵoj, restoracioj, muzikoj kaj interparolado, vi supozas ke vi estas en eksterlando. En tiu dinamika urbo, de la 12-a ĝis la 17-a de julio kunokazis la 29-a Brazila Kongreso de Esperanto kaj la 14-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso.

La 29-a BKE estis treege bone planita de la Loka Organiza Komitato, kompetente gvidita de S-ro Gilbert Ledon. Pro tio, ke la 28-a BKE, en Anápolis, ankaŭ estis tre bone planita de la tiea LOK, ni supozas, kaj arde deziras, ke niaj venontaj naciaj kongresoj sekvu tiun imitendan profesio-nivelan vojon. La belaspektaj kaj riĉenhavaj kongreseroj, la kompetente redaktitaj kongresaj ĵurnaloj far de S-ro Giuseppe Grattapaglia, kaj la tuja preparo de spezokonto, far de la LOK-kasisto, S-ro José Martins Coelho, estas ekzemploj de antaŭaj, dumaj kaj postkongresaj taskoj efike pritraktitaj. BEL gratulas ĉiujn, kiuj ebligis tian sukceson!

Universitato Mackenzie, tradicia kaj fama altlernejo de San-Paŭlo estis la kongresejo. En la kongresa solena malfermo, prezentita de Prof-ro Walter Francini, krom elstaraj esperantistoj ankaŭ ĉe-estis Prof-ro Orlando Monezzi Junior, reprezentanto de la Rektoro de Universitato Mackenzie, S-ro Leszek Kowalski, Vic-Konsulo de Pollando kai S-ro Arimantas Rackauskas, urbestro de Kaunas (Litovio). Bedaŭrinde, brazilaj aŭtoritatuloj ne ĉe-estis. Tamen la guberniestro de Ŝtato San-Paŭlo, S-ro Luiz Antonio Fleury Filho, sendis skriban saluton. La muzik-orkestro "Banda Metropolitana de São Paulo" kaj la Ĥoro de "Empresa Bra-

sileira de Correios e Telégrafos" artkontribuis la solenaĵon. Prof-ro Sylla Chaves enkondukis la kongresan temon " Homaj Manifestiĝoj Rilate al Esperanto".

Pli ol 500 partoprenantoj (723 aliĝintoj) el 5 landoj kaj 19 brazilaj Ŝtatoj ĝuis, laŭ ties elektoj, la sekvantajn erojn: 30 prelegoj, seminario de Delegita Reto, informado pri Esperanto en portugala lingvo, ekzamenoj de elementa, mezgrada kaj supera kursoj, Cseh-Seminario, kurso pri tradukado, baza kurso, Cseh-metodo kaj artvesperoj (baleto, danco, muziko, deklamado, skeĉo, teatraĵo). Ankaŭ okazis ekspozicioj pri arto, filatelio, skoltismo, Utinespo ("UTilidade INternacional do ESPerantO").

BEL-Libroservo, Kongresa Ĵurnalo (5 tagoj), duontagaj ekskursoj (3), adiaŭa vespermanĝo (200 partoprenantoj), komuna loĝejo, manĝoservo loka, kaj aŭtobusa transportado estis la variaj servoj por distri, bone informi kaj faciligi la partoprenon de ĉiuj kongresanoj.

Aparte menciinda estas la Infana Kongreseto SINI (Semado Inter Niaj Infanoj), la Gazetara Servo kaj la ĉe-esto de eksterlandanoj en nia kongreso. Cirkaŭ 70 infanoj (inter kiuj 50 skoltoj) partoprenis la Infanan Kongreseton, sub la kunordigo de Denise Vaz Bruno kaj aliaj geinstruistoj. La Gazetara Servo, sub la respondeco de ĵurnalisto Luiz Cesar Pena, informis, antaŭ kaj dum la kongreso, 52 gazetojn kaj radio-televidajn staciojn, kio rezultigis intervjuon en radielsendo kaj aperon de artikoloj en gazetoj. Esperantistoj el Argentinio, Francio, Germanio, Litovio kaj Urugvajo igis nian kongreson "internacia". La urbestro de Kaunas (Litovio) kantis dum arta programo, kaj la prezidantoj de argentina, brazila kaj urugvaja landaj asocioj kunvenis kaj decidis ke, en la kadro de la venontjara Argentina Esperanto-Kongreso (de la 31-a de Marto ĝis la 3-a de Aprilo) oni aranĝos plurlandan renkontiĝon de Sud-Amerikaj Esperanto-Asocioj por pritrakti komunan strategion.

Kiel kutime, la estraro de BEL kaj la membroj de la Federacia Konsilantaro profitis la kongreson por kunveni. El tiuj kunvenoj ni reliefigas la jenajn erojn: aprobo de BEL-estrara jarraporto; enposteniĝo de S-ro Ivaldo Alves de Souza kiel prezidanto de la Federacia Konsilantaro kaj de S-ro Francisco Mattos de Oliveira, kiel prezidanto de BEL; oni decidis, ke dum la 30-a BKE okazonta en la urbo Natal, la Federacia Konsilantaro prezentos proponon pri regularo rilate al funkciado de Fondaĵo Almada; aprobo de BEL-estrarpropono, prezentita pere de LIGILO n-ro 18, kiu rilatas al projektoj prilaborotaj de esperantistoj individue aŭ grupe, celantaj disponigi vojojn por ke la Federacia Konsilantaro, surkampe de strategia plano, BEL-estraro,

pere de siaj laŭstatutaj taskoj, kaj la diversaj esperantaj organizaĵoj pere de siaj nepre necesaj apogoj, pliboniigu kaj antaŭenigu la brazilan movadon.

La Solenan Fermon prezentis S-ro Amarílio Hévia Carvalho. Post kongresa raporto kaj dankesprimoj, oni finis la kongreson pere de korusaj kantoj.

Surbaze de la kongresa temo estis aprobita kongresa rezolucio, redaktita de Prof-ro Sylla Chaves, S-ro Aloisio Sartorato kaj S-ro Ivon Barbosa. Jen ĝia teksto:

## KONGRESA REZOLUCIO

Kunsidante en la urbo San-Paŭlo, inter la 12-a kaj la 17-a de Julio 1993, la partoprenantoj en la 29-a Brazila Kongreso de Esperanto prezentas la jenan rezolucion:

Konsiderante, ke tro ofte - per vortoj, agoj aŭ silento - estas homaj manifestiĝoj indiferentaj aŭ malfavoraj pri Esperanto;

Konsiderante, ke pri tiaj manifestiĝoj, almenaŭ parte, ni mem kulpas pro ne trafa informa agado;

Ni proponas al la brazila esperantistaro:

1. Ke ni, atente, tolereme kaj sen antaŭjuĝoj, aŭskultu kaj priatentu tiujn manifestiĝojn;
2. Ke, kiam eble, ni faru sociajn esplorojn por mezuri la ĝustan dimension de la problemo;
3. Ke tiu temo estu diskutata en lokaj aŭ regionaj seminarioj;
4. Ke, je la lumo de tiuj esploroj kaj diskutoj ni strategie pliboniigu nian agadon.

## RIBEIRÃO PRETO KAJ LA 54-a TUTAMERIKA MEDICINA KONGRESO DE HOMEOPATIO.

Dum la pasinta jarcento vilao kaj ĝia floranta kafkulturo altiris elmigrintojn de Portugalio, Hispanio kaj Italio. Kun la tieaj indiĝenoj, mestizoj, negraj sklavoj kaj eks-sklavoj ili kreskigis kaj la vilaon kaj la kafproduktadon. Iom post iom tiu vilao progresis kaj fariĝis urbo en 1889. Hodiaŭ ĝi estas la plej grava industria centro de orienta regiono de Stato São Paulo. Moderna, klera kaj impona, tiu urbo - Ribeirão Preto - gastigis ne-esperantan eventon, kie Esperanto elstaris.

De la 25-a ĝis la 27-a de julio ĉi-jare, 400 profesiuloj, el kiuj 62% estas kuracistoj, 30% farmacistoj, 8% veterinaroj kaj dentistoj, partoprenis de la 54-a Tutamerika Medicina Kongreso de Homeopatio. Krom ili, ankaŭ partoprenis 100 ne-profesiuloj, el kiuj 60 estas esperantistoj. La eksterlandanoj venis el Argentinio, Ĉilio, Kolombio, Kubo, Meksikio kaj Venezuelo.

Por interesveki tiujn diversajn kongresanojn, la programo enhavis kaj komunajn kaj ekskluzivajn erojn. Por ne-profesiuloj (esperantistaj aŭ ne) okazis lanĉo de la dulingva libro "Homeopatio - Populara Orientado / Homeopatia - Orientaçao Popular"; lanĉo de libro pri la vivo de Hahnemann, nur portugallingve; lanĉo de poŝt-kartoj pri Muzeo Abrahão Brickmann kaj pri Instituto Homeopatia François Lamasson (IHFL).

Ekskluzivaj programeroj por esperantistoj estis Baza Kurso, Cseh-Metodo, gvidita de Atilio Orellana Rojas; Supera Kurso (gramatiko, lingvistiko kaj historio de Esperanto), gvidita de Prof-ro Geraldo Mattos; kurso Homeopatio en la Hejmo. Ekskluziva kurso por ne-esperantistoj estis Homeopatio en la Hejmo, portugallingve.

En la profesia parto de la Kongreso, E-o aperis trifoje, nome, budo de Brazila Esperanto-Ligo en la kongresa foiro; prezento de la Departemento de Esperanto de IHFL, ĝiaj celoj kaj proponoj ene de la scienca programo de la kongreso; Renkontiĝo de Esperantistaj Homeopatoj, kun decido pri propono de Esperanto kiel internacia lingvo mondskale.

En la distraj partoj, la partoprenantoj vizitis muzeojn, katedralon, najbarajn urbojn; frandis koktelon kaj vespermanĝon; ĝuis ĉiuvesperajn prezentojn de muzikaj ensembloj.

La enkonduko de E-o en tiun kongreson per si mem meritas aplaŭdon kaj gratulon. Tamen la plej grava rezulto de la senlacaj poresperantaj laboroj de D-ro Izao Carneiro Soares, Neusa Priscotin Mendes kaj de la ceteraj helpantoj estas la jena

REZOLUCIO

Konsiderinde ke, la manko de komuna lingvo malhelpas la komunikadon de homeopatoj, kaj la samtempa tradukado en kongresoj ĉiam okazigas miskomprenojn;

Konsiderinde ke, la naciajn lingvojn oni devas gardi kaj ke lingvo de aparta nacio ne indas fariĝi interlingvo ĉar tiu neeviteble iĝos hegemonia;

Konsiderinde ke, Esperanto kiel neŭtrala internacia lingvo apartenas al neniu nacio, estas propraĵo de la tuta homaro kaj bonvena al ĉiuj landoj;

Konsiderinde ke, Esperanto taŭgas ankaŭ kiel pontolingvo por tradukado al ĉiuj naciaj lingvoj;

La partoprenantoj de la 54-a Tutamerika Medicina Kongreso de Homeopatio decidas proponi:

1. Ke Esperanto estu enkondukita kiel plia oficiala lingvo en la Tutamerikaj Kongresoj de Homeopatio,

2. Ke kaj la lernigaj institucioj pri Homeopatio kaj la homeopatiaj fakaj asocioj ekde nun enkonduku Esperanton kiel mondskalan interlingvon de homeopatoj, tiel ebligante ke en proksima estonteco Homeopatio estu pli bone diskonigita en la tuta planedo kaj ke ĉiuj kiuj laboras en ĝia kampo povu interŝanĝi spertojn sen la bezono utiligi aliajn lingvojn,

3. La okazigon de estontaj renkontiĝoj de homeopatoj interesiĝantaj pri Esperanto.



FOTIS DEISIMARA XAVIER

Jen la Solena Malfermo de la 29-a Brazila Kongreso de E-o.

# FONDAĴO ALMADA

Dum la 28-a Brazila Kongreso de Esperanto, en Anápolis (GO), julie 1993, la Federacia Konsilantaro de BEL starigis fondaĵon, kies celo estas finance subteni BEL-on rilate al specialaj projektoj, el kiuj la plej urĝa estas la pligrandigo de BEL-sidejo. Oni ankaŭ decidis, ke kunfondantoj estus tiuj, kiuj donacus minimuman kvanton samvalora al 26 usonaj dolaroj, ĝis la sekvonta Kongreso, en São Paulo. Tiel aperis Fondaĵo Almada.

Post 1 jaro jen ĝia situacio:

LASTAJ RICEVITAJ DONACOJ: José Mário Marques (CR$ 1.690,00), Manoel Torres Abreu (CR$ 1.700,00), Sirio Silva (CR$ 1.690,00), Paulo Gontijo Veloso de Almeida (CR$ 1.794,00).

TOTALA SUMO RICEVITA.............................CR$ 40.685,02

TOTALA BANKA SALDO (kapitalo+rento)...........CR$ 368.266,00

Kvankam oni atingis la limdaton por ke la donacantoj fariĝu kunfondantoj, Fondaĵo Almada daŭras kaj ĉiuj donacoj estas bonvenaj.

Kompreneble, BEL-estraro kaj la donacintoj estus pli feliĉaj se la kvanto jam ricevita sufiĉus por aĉeti almenaŭ ĉambron simila al tiu de BEL-sidejo. Tamen, dum unu jaro Fondaĵo Almada atingis 20%-on de la necesa kvanto. Do ĉu nur post 5 jaroj ni atingos nian celon?... Jen grava demando! Se ĝis la fino de 1994 oni ne sukcesos solvi la aferon rilate al manko de spaco, BEL-estraro alfrontos grandan problemon, ĉar ĝi devos redoni la pruntitan ĉambron, kie nun estas la Biblioteko kaj kie funkcias la Perkoresponda Kurso. Ĉu lui alian ĉambron? Ĉu draste malpligrandigi niajn servojn?

Celante eviti tiun malfacile solveblan situacion, BEL-estraro pretigas diversajn "vojojn" pere de kiuj ni ĉiuj kunigu niajn fortojn kaj venku tiun batalon kontraŭ la tempo. Baldaŭ ĉiuj ricevos informojn tiurilate. Dume ni memoru, ke longa marŝado ekkomencas per unu simpla paŝo! Fondaĵo Almada jam marŝis multajn paŝojn. Gravas nur tiu, ke ĝi marŝu senĉese...

## LASTAJ INFORMOJ

Pro profesiaj kialoj, F-ino Néia Lúcia de Souza translokiĝis al la ĉefurbo Macapá (AP). Post kelkaj monatoj, ŝi konkludis ke ne estas facile prezidi BEL-on loĝante en tiel malproksima loko, kaj perletere ŝi rezignis la postenon. Dum kunveno de la Federacia Konsilantaro, kadre de la 29-a BKE, oni akceptis ŝian rezignan peton, kaj aprobis laŭdon pri ŝia laboro poresperanta. BEL-estraro dankas kaj gratulas ŝin pro la laboro, kiun ŝi faris kaj certe daŭre faros por nia movado.

- o O o -

Pro teknikaj problemoj en nia mikrokomputilo, ĉi tiu LIGILO malfruiĝis. Tamen la sekvontan, t.e., LIGILO n-ro 20 vi ricevos pli frue ol kutime.

- o O o -


**La plej ofta...**

**Eventoj**

*Internacia movada gazeto por aktivaj esperantistoj!*
*Aperas dusemajne, legata en pli ol 40 landoj...*
*Petu senpagan provekzempleron:*
*EVENTOJ, pk. 87. H-1675 Budapest, Hungario*

**la plej**
vaste legata junulara gazeto
rekomendinda por komencantoj
bela kaj moderna
diversa kaj amuza
interesa por ĉiuj

Abonu ĉe via
UEA-kotizperanto aŭ
petu provekzempleron
kontraŭ unu internacia
respondkupono ĉe TEJO,
Nieuwe Binnenweg 176,
NL-3015 BJ Rotterdam,
Nederlando.





Aboneblaj ĉe BEL, kiu ankaŭ peras pli ol 30 periodaĵojn! Petu la tutan liston!

**Remetente:** BRAZILA ESPERANTO-LIGO
**Caixa Postal 03625 CEP 70084-970**
**BRASÍLIA - DF Telef: 061 226-1298**

IMPRESSO